

Leterkesto, 5.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.04.25 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj CJaude kaj Andree GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni daŭngas nian salutadon al la geaŭdantoj, kiuj sendis mesaĝon.

A.- Ni dankas al Vilmos SÁGI en Szvár, Hungario, kiu sendis du mesaĝojn, al Haligrimnur SAMUNDSSON en Ganabu, Islando kiu skribis:

Cl.- "Kia feliĉo kaj bonŝanco. Mi ĵus aŭskultis vian elsendon je la 15a horo 15. Oni povus supozi, ke vi kaj Borsboom elsendus per Radio Reyjkjavik, tiel bone mi aŭdis per la eta Sony ICF-SW1 kun aktiva anteno. Estus grandioze povi denove partopreni kurson en La Chaux-de-Fonds kaj eventuale ĝui la instruadon de Borsboom."

A.- Kimihiro SAKAGAMI en Osaka, Japanio, sendis aŭdraporton.

Cl.- Saluton al Petro ŠARŠE en Praha, Ĉeĥoslovakio kaj al Erich SEIDEMANN en Dresden, Germanio, kiu petis kiel kristnaskdeziron fotokopioon de la didaktikaj rendevuoj kaj ankaŭ de la recenzo de la romano "La longa vojo" de Meye. Ni kontentigos lin, same kiel la aliajn petintojn de tiuj fotokopioj de elsendoj.

A.- Anton SCHAFFER en Zeltweg, Aŭstrio, ŝatas aŭskulti radioelsendojn en Esperanto kaj Heinz SCHINDLER en Schwelm, Germanio, tiel raportas pri esperanto-ekspozicio:

Cl.- "Mi denove faris esperanto-ekspozicion en la enirhalon de la distrik-administrejo en Schwelm. Schwelm estas la ĉefurbo de la distrikto Ennepe-Ruhr inter Dortmund kaj Wupertal. La ekspozicio daŭris eĉ 5 monatojn, de la 15-a de marto ĝis la 15-a de aŭgusto 1990 kaj miloj da homoj vidis ĝin. Unu el la vitrinoj estis sole dediĉita al la temo "Esperanto en Radio". En la mezo estis la granda bildkalendaro de Radio Pekino kaj ĉirkaŭe estis la radio-programkajeroj de Radio Bern, Pekino, Romo kaj Vatikano kaj korespondkartoj aŭ leteroj de tiuj radiostacioj. Plie en ĝi estis germanlingvaj klarigoj kaj la informpaĝo pri ĉiuj radiostacioj, kiuj elsendas en Esperanto, el la gazeto "Esperanto" de UEA. Kvar lokaj gazetoj raportis pri la ekspozicio."

A.- Ni longe citis tiun raporton por instigi aliajn aŭdantojn ankaŭ pretigi tian ekspozicion. Ni devas diskonigi nian lingvon per faktoj.

Cl.- Saluton al Ilja SCHISCHKIN en Leningrad, Sovetio, kiu eklernas esperanton, estas kontenta pri niaj radioprogramoj, al Erich SEIDEMANN en Dresden, Germanio, al Gilberto SILVA VELHO en Cagapava, Brazilo, al Barbara SMOCZENSKA en Rzeszow, Pollando, al Bogustaw SOBOL en Milanowek, Pollando, al Jef STAELS en Bruselo, Belgio, kiu sendis du mesaĝojn kaj skribis:

A.- "Viaj elsendoj min multe helpas en mia studado de nia amata lingvo. Multan dankon al vi "Esperantofakistoj"! Kaj - kompreneble - nun venas miaj petoj: mi ŝategus ricevi la fotokopiojn ne nur de la du aŭskultitaj elsendoj, sed eĉ de la tuta serio pri la instruado, do ankaŭ de la venontaj.

Cl.- Ni profitas averti niajn aŭskultantojn, ke la revuo "Literatura Foiro" publikigos serion de niaj "Didaktikaj Rendevuoj".

A.- Saluton al Stanislav ŠTEFAN en Kladno, verŝajne Pollando. Lia adreso ne estas kompleta en lia letero. Li skribis:

Cl.- "Mi sukcesis ekkapti vian elsendon antaŭ la 9-a horo hodiaŭ matene. Mi tuj skribas al vi por ekscii, ĉu vi disaŭdigas ankaŭ dum aliaj tagoj kaj je kiuj tempoj kaj ondoj. Mia nuntaga ekkapto de via elsendo estis nur hazarda por mi. Feliĉa hazardo, kompreneble.

A.- Saluton al František STEJSKAL en Osek, Ĉeĥoslovakio, kiu sendis 3 poŝtkartajn mesaĝojn, al Z. ŠTERBA en Tarun, Bulgario, al František ŠTOVIČEK en Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio, al Phillis STRAPPS en Felixstowe, Britio, al Hans Georg STRAUSS en Leverkusen, Germanio, kiu sendis 2 raportojn pri la aŭdado de pluraj elsendoj.

Cl.- Saluton al Loseva SVETLANA en Sovetio, la urbonomon ni ne kapablas legi. Ŝi raportas pri la malsata situacio, kiun alfrontas ŝia familio. El orienteŭropaj landoj kaj ĉefe Sovetio pluraj leteroj mencias tiujn dramajn malsatproblemojn, kontraŭ kiuj ni estas absolute senpovaj. Laŭ nia scio en la koncernaj landoj agrokultivado produktas sufiĉe, sed ia disvendo estis tiel malbone organizita de la komunisma sistemo, ke la varoj putras anstataŭ atingi la aĉetantojn. Ni estas konvinkitaj, ke privatigo de la agrokulturo kaj de la komerco en la ekskomunismaj ŝtatoj alportos iompostioman solvon al tiu grava problemo, kiun kreis burokratiska centralismo kaj unupartia regado, kiu ne akceptis kritikadon. La malsatproblemo en Afriko fontas el tute aliaj kaŭzoj: kreskanta sekeco, plimultiĝo de la loĝantaro, analfabeteco kaj senarbariga brutbredado sin unuigas por malhelpi la klerigadon de la kultivistoj. Ni estas pesimismaj por la estonteco de tiuj afrikaj landoj, kies loĝantaro tro kreskanta estas neniel matura por eniri la modernan pensmanieron.

A.- Saluton al TADACUNA Nomra en Uto-shi, Japanio, ai Darius TELYĈENAS en Jonava, Litovio, kiu aŭdas nin tre bone, al Alexander THALER en Ebnat-Kappel, Svislando, kiu sendis tri mesaĝojn kaj skribas koncerne prelegojn de nia kolego Arthur BAUR:

Cl.- "Estas mirige, ke ankaŭ ni svisoj mem bezonas viajn esperanto-elsendojn por koniĝi kun nia svisa historio. Ĝis hodiaŭ mi ne sciis, ke komence de nia jarcento la uzo de aŭtomobiloj estis leĝe malpermesita al grizona kanton! Hodiaŭ tia leĝo estus nebla kaj maldezirinda, sed oni devas uzi la aŭton laŭeble malmulte pro naturprotektado".

A.- Koncerne nian laŭtleĝon de noveloj, li diris, ke tio bone plaĉis al li.

Cl.- Jindrich TOMIŠEK en Rikovice, Ĉeĥoslovakio, skribis:

A.- "Mi kore salutas vin la unuan fojon en la nova 1991-a jaro. Pardonu al mi, ke mi tiel longe silentis kaj ne skribis... Post akcidento, kiu min trafis la 22-an de oktobro lastjara kaj dum kiu mi glitfalis desupre de la ŝtupetaro al subtegmento malsupren sur randon de metala barelo kaj kun grave kontuzita ventro kaj tri rompitaĵoj, mi kuŝis longajn tagojn en hospitalo certe, sed poste resaniĝante hejme mi havas sufiĉe da libera tempo, mi do krom alia denove provis aŭskulti viajn kaj aliajn esperanto-elsendojn. Mi tre estimas viajn esperanto-elsendojn, vi ja peras eĉ informojn, kiujn la oficialuloj en certaj landoj rifuzis aŭ rifuzas publikigi. Mi alte taksas, ke via Svisa Radio Internacia konceptas sin neŭtrala, objektiva kaj politike sendependa disaŭdiganto de informoj. Kompreneble ĝi dankas tion al la demokratia kaj libereca sistemo de Svislando. Mi alte taksas, ke vi provas prezenti kaj fakte prezentas Svislandon kiel eble

plej objektive, ne trudante ĝin kiel modelon, sed kiel peranton de spertoj kaj ideoj, kiuj eble ankaŭ aliloke, en nia lando certe, povas esti utilaj. Mi ĉiam do ĝojas, se mi povas aŭskulti lunde pere de mia radioricevilo VF 206, de d-ro Arthur Baur kaj d-ino Heidi BAUR prezentatan propogramon pri svisaj temoj, ĵaŭde programon pri esperantaj temoj prezentata de ges-roj Claude kaj Andree GACOND, aŭ se mi sabate povas aŭskulti programon pri la internacia esperanto-movado en prezento de s-ro Andy KUNZLI..."

Cl.- Por tiuj, kiuj ne regule aŭskultas la elsendojn de SRI, tio estis bona priskribo de la aŭdebloj. Ni rememorigas, ke detalaj programoj kun la aŭdebloj estas riceveblaj. Ne ricevantoj petu ilin skribante al Svisa Radio Internacia, CH-300 BERN 15, Svislando.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj André GACOND remalfermos sian leterkeston por saluti skribintojn. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*